



MEMORI POR FORGESI

鲁迅 为了忘却的纪念

Verkis Lusin

Esperantigis Guozhu

Lusin:

MEMORI POR FORGESI

(1933)

1

Jam delonge mi volas verki ion por memori kelkajn junajn verkistojn. La motivo ne estas io cetera: dum la lastaj du jaroj indigno kaj tristo de tempo al tempo atakas mian koron, kaj ĝis nun ankoraŭ ne ĉesis, tial, mi tre volas preni la verkon kiel mian skuiĝon, kiu forigus de mi la triston kaj iom malŝarĝigos min. Por diri malkaŝe, mi ja volas ilin forgesi.(1)

Antaŭ du jaroj, en februaro 1931, je la nokto de la sepa aŭ mateno de la oka, niaj kvin junaj verkistoj estis samtempe murditaj. Tiam, neniuj ĵurnalo en Ŝanhajo kuraĝas informi pri tio, aŭ eble ili ne deziris, aŭ simple opiniis ĝin neinforminda. Nur en la "Literatura Novaĵo" estis mallonga ambigua artikolo. En n-ro 11 (datita je 25a de majo), s-ro Lin Mang skribis en lia "Impreso pri Bai Mang" (2) jene:

"Li verkis multe da poemoj kaj tradukis kelke de Petofi, la hungara poeto. Ricevinte lian manuskripton, Lusin, tiama red. de <Toronto> skribis leteron al li por rendevui, sed li estis homo kiu ne deziras viziti al famuloj, fine Lusin mem vizitis al li kaj energie kuraĝigis lin agi en literaturo. Tamen, li ne povis verki fermante sin en subtegmento. Li ree iris sian vojon. Post nelonge, li estis refoje arestita....."

Tiu skribo pri ni fakte estas ne vera. Bai Mang ne estis tiel aroganta. Li vizitis mian loĝejon, sed ne pro mia peto. Ankaŭ mi ne estis tiel aroganta ke mi aŭdacus per letero facilanime voki iun nekonatan kontribuanton. La kaŭzo de nia intervidiĝo estis tre natura. Ĉar tiam lia kontribuo estis biografio de Petofi, tradukita el germana lingvo, do mi leteris por peti la originalon, kiu troviĝis en la poemaro kiel prefaco kaj estis maloportuna por sendo tra poŝto, do li persone ĝin alportis. Laŭaspekte li estis junulo dudekkelkjara, kun regula trajto kaj malhela haŭto. Pri kio ni tiam interparolis, mi jam forgesis. Mi nur memoras ke li mem diris ke li havis la familian nomon Xu kaj estis el Xiangshan. Mi demandis al li, kial la f-ino kiu peras lian poŝtaĵon havas tiel strangan nomon (mi ankaŭ forgesis kiel strangan estis ŝia nomo). Li respondis ke ŝi ja ŝatas tiel nomi sin, ĉar ŝi estas romantika, kaj ankaŭ li mem ne en ĉio akordiĝas kun ŝi. Jen ĉio kion mi ankoraŭ memoras.

Nokte, mi maldetale komparis lian tradukon al la originalo kaj trovis, krom kelkaj mistradukoj, unu intencan aliigon. Verŝajne al li ne plaĉas la vorto "nacia poeto", kiun li senescepte anstataŭigis per "popola poeto". La sekvan tagon mi ricevis de li leteron, en kiu li skribis ke li pentas pri nia intervidiĝo, ĉar dum li parolis multe, mi diris nur malmulte kaj seke, kio iel donis premon al li. mi do skribis leteron al li ekspliki, dirante ke estas kompreneble se oni parolis malmulte dum la unua intervidiĝo, kaj admonis al li ke oni ne devas ŝanĝi la originalon pro sia plaĉo. Ĉar lia libro kun originalo restis ĉe mi, mi donacis al li du volumojn de Petofi el mia kolektaĵo kaj sugestis ke li traduku plu kelkajn poemojn por nia legantaro. Efektive li tion faris kaj mem alportis la tradukojn, tiam ni interbabilis pli multe ol la unuafoje. Tiuj poemoj kaj la biografio poste aperis en n-ro 5, vol. II de "Toronto", nome, en ĝia lasta n-ro.

La tria intervidiĝo okazis en iu somertago, laŭ mia memoro, iu frapis pordon, mi iris ovri kaj ekvidis Bai Mang, tamen, surportantan dikan vatrobon, kun ŝvitoj sur tuta vizaĝo, ambaŭ ni ekridis nedeteneble. Nur tiam li sciigis al mi ke li estas revoluciisto, ĵus liberigita el karcero. Ĉiuj liaj vestoj kaj libroj estis konfiskitaj, inkluzive la du volumojn de mi donacitajn. La robo, kiun li surportas, estis pruntita de amiko. Ĉar li devas surporti longan veston tamen ne havas substofitan, do li nur povas tiel ŝviti. Mi supozis, tio eble estis tiu fojo kiam li estis "refoje arestita" laŭ s-ro Lin Mang.

Mi tre ĝojas pri lia elkarceriĝo, kaj rapide pagis al li honorarion, por ke li povu aĉeti substofitan veston. Samtempe, mi treege doloras pri miaj du libroj falintaj en manon de policano --- jen perlo droninta en mallumon. La libroj mem ne estas iel specialaj: unu volumo de prozo, la alia--- de poemaro, editoritaj de germana tradukinto, laŭ kies juĝo, eĉ en Hungario mem ne troviĝas tiel kompleta kolekto. Tamen, presita en la Universala Biblioteko de Reclam, en Germanio ĝi estis ĉie trovebla kaj kostas apenaŭ unu dolaron. Sed por mi la libroj estas trezoroj, ĉar mi aĉetis ilin el Germanio speciale pere de La Marusen Librejo (3) antaŭ tridek jaroj, kiam mi arde amas Petofi. Kiam mi ekdiris mian peton, mi sentis grandan maltrankvilon timante ke la komizo rifuzos peri pro la tro malkara prezo. Poste mi nur kunportis ĉe mi ambaŭ volumojn, sed mia intereso ŝanĝiĝis kun la tempopaso kaj jam ne havis la inklinon ilin traduki. Mi decidis donaci ilin al la junulo, kiu ankaŭ amas poemojn de Petofi same kiel mi siatempe kaj rigardis tion bona fino por la libroj. Tial mi ja serioze petis ke Roushi ilin sendu persone. Kiu atendis ke ili fine falis en manojn de "tri-striulo"(4) k.s. Kiel domaĝe!

2

Ke mi neniam invitis kontribuinton por intervidiĝi, tio rezultigis ne tute de mia modesteco, sed ankaŭ de konsidero, ne malpli grava motivo, por eviti ĝenaĵon. De longtempa sperto mi sciis, ke naŭ el dek junuloj, precipe junaj verkistoj, estas sentemaj kaj kun forta memestimo. Eĉ eta neglekto tre facile kaŭzus ilian miskomprenon. Tial je pli multe da okazoj mi ja intence ilin evitis. Timante la intervidiĝon, do por ne paroli pri ian komision. Sed tiam en Ŝanhajo estis unika juna verkisto, kun kiu mi ne nur kuraĝas libere babili, sed ankaŭ konfidi al li iujn miajn privatajn aferojn, tiu estis Rousi, sendinta la librojn al Bai Mang.

Mi forgesis kiam kaj kie mi unuafoje vidis Rousi. Verŝajne li diris ke li iam aŭskultis mian lecion en Pekino, do, tio devas okazi antaŭ ok aŭ naŭ jaroj. Mi forgesis ankaŭ tion kiel ni ekinterkomunikiĝis en Ŝanhajo. Tamen, li loĝis tiam en strateto Jingyunli, apenaŭ kvar aŭ kvin pordojn for de mia loĝejo, kaj jen, oni ne scias kiel jam komenciĝis nia interamikiĝo. Eble, jam en la unua fojo li diris al mi ke lia nomo estis Zhao Pingfu (Paca Returno). Sed foje, parolante pri la senbrida aroganteco de loka tirano de lia hejmloko, li diris ke iu biensinjoro trovis lian nomon bonaŭgura kaj avertis lin ĉesi uzi ĝin, ĉar tiu volis rezervi por sia filo. Tio igis min suspekti ke la "fu" en lia origina nomo estis tiu ideogramo kun signifo de "feliĉo", ĉar "Paca Feliĉo" ja pli plaĉus al la biensinjoro ol "Returno". Lia hejmloko estis Ninghai de Taizhou, kion vi povas rimarki tuj de lia taizhou-isma obstineco. kaj li estis ankaŭ sufiĉe pedanta, tiel ke mi iam pretervole ekmemoritis pri Fang Xiaoru (5), kiun mi imagis tre simila al li.

Fermante sin en loĝejo per literaturo, li kaj verkis, kaj tradukis. Post multtaga interkomunikiĝo, ni havis harmonian ideon kaj, kunvokinte kelke da junaj

kompanoj, ni fondis la Societon Matena Floro. Nia celo estis konigo de literaturo de Orienta kaj Norda Eŭropo kaj importo de fremdaj lignografikaĵoj, ĉar ni ĉiuj opiniis ke ni devas subteni la viglan simplan arton. Kaj, laŭ tiu linio, ni pretigis publikigon de <La Matena Floro>, <Modernaj Noveloj de Diversaj Landoj> kaj <La Ĝardeno de Arto>. Publikiĝis ankaŭ la <Pentraĵoj de Koĝi Kukiva> (6) por balai la pseŭdan "artiston" sur Ŝnhaja Bordo, t.e. por trapiki la papertigron Ye Lingfeng.

Sed Roushi mem ne posedis monon. Li pruntis pli ol 200 dolarojn por komenci la presadon. Krom aĉeti paperojn, li devas preni sur sin la plejparton de rekta kaj ceteraj laboroj --- viziti presejon, fari grafikaĵojn kaj revizii provpresadon. Sed lin trafis ofte malagrablajoj, kiujn li rakontis kun brovoj kuntiriĝintaj. En liaj fruaj verkoj saturis pesimisma etoso, sed tia ne estis lia karaktero: Li kredis ke la homoj estas bonaj. Kiam mi parolis pri trompo, perfido, sangavido fare de homoj, li protestis kun ŝvitbrila frunto kaj miopaj okuloj, rondigitaj de surprizo: "Ĉu povus esti tiel?... Eble ne..."

Sed baldaŭ la Societo Matena Floro bankrotis, pri la kaŭzo mi ne volas klare diri. Unuvorte, antaŭ ĉio la idealista kapo de Roushi koliziis kontraŭ dura muro. Vaniĝis ne nur ĉiom da lia pena laboro, li ankaŭ devas prunti plu 100 dolarojn por pagi la paperkoston. Poste, reduktiĝis lia dubo pri mia aserto ke "la homa koro estas fia". Kelkatempe li suspiris: "Ĉu vere estas tiel?..." Sed, li ankoraŭ kredas ke la homoj estas bonaj.

Do li unuflanke sendis la restantan stokon de la Societo Matena Floro, kiun li rajtas ricevi, al Morgaŭ Librovendejo kaj Guanhua Librejo, esperante per tio

reakiri iomete da monoĵ, kaj samtempe penegede traduki por kvitigi la debeton. Al la Komerca Presejo li vendis siajn tradukojn <Dana Novelaro> kaj <La Afero de Artamanov> de Gorkij, sed mi supozas, ke tiuj manuskriptoj eble estas forbruligitaj lastjare de milita fajro. (7)

Iom post iom ŝanĝiĝis lia pedanteco, fine li ankaŭ kuraĝas iri kune kun knabinoj--- amikino aŭ samlokanino--- tamen li ĉiam tenas sin almenaŭ tri aŭ kvar futojn for de ŝi. Tio estis tre malbone. Ĉar, kiam mi renkontis lin survoje, nur se iras bela f-ino apude aŭ proksime je tri aŭ kvar futoj for de li, mi ĉiam suspektis ŝin lia amikino. Sed kiam li kuniris kun mi, li sintenis al mi tiel proksime ke li preskaŭ min subtenas. Fakte ĉar li timis ke mi estus kolizimortigita de aŭto aŭ tramo, dum miaflanke mi ankaŭ maltrankvilas pro lia miopeco kaj zorgemo pri alia homo, tiel ambaŭ ni ĉagrenis embarase dum la tuta vojo. Tial, se ne en necesega okazo, mi neniam iris kune kun li. Ĉar mi ja rigardis lin peniga, sekve min peniga.

Laŭ moralo, ĉu malnova aŭ nova, tion, kio nur estas utila al aliaj, li elektis kaj portis sur sin mem, eĉ se tio kaŭzis malprofiton al li.

Fine li decidis ŝanĝiĝi definitive. Foje li klare sciigis min ke li devas ŝanĝi la enhavon kaj formon de sia verko estonte. Mi hezitis responde: Tio malfacilas. Ekzemple, devigi homon, kiu kutimis ludi spadon, ludi stangon, ĉu tio eblas? Li respondis simple: Nur eklernu!

Li ne diris bombaston, sed efektive eklernis denove. Tiam li vizitis min foje kun amikino, f-ino Feng Keng. Ni iom konversis, sed baro ĉiam staris inter ni. Mi

suspektis ke ŝi estas iom romantika kaj pledanta por rapida sukceso. Mi suspektis ankaŭ, ke kaŭze de ŝia instigo, Roushi lastatempe volas verki longan romanon. Sed samtempe mi suspektis ankaŭ min mem: eble la antaŭa decidema respondo de Roushi ĝuste trafis la cikatron de mia argumento, kiu fakte estis maldiligenta intenco kaj mi subkonscie imputis mian koleron al ŝi. Fakte, mi ne estis pli prudenta ol la nervozaj kaj memestimaj junaj verkistoj, kun kiuj mi timas intervidiĝi.

Ŝi estis delikata f-ino, kaj ne bela.

3

Nur post la fondiĝo de la Ligo de Maldekstraj Verkistoj mi eksciis ke Bai Mang, konata de mi, estis ĝuste Yin Fu, kies poemoj aperadis en <La Pioniro> Mi do portis al li foje, okaze de kunveno, germanan tradukon de verko pri vojaĝo tra Ĉinio far usona ĵurnalisto por helpi al li en lernado de germana lingvo kaj tute sen alia profunda sugestio. Tamen li ne ĉeestis, kaj mi devis refoje peti transdonon de Roushi.

Sed post nelonge, ili ambaŭ estis arestitaj samtempe, kaj mia tiu libro ankaŭ konfiskita, denove falinta en manojn de "tri-stri-ulo" k.s.

4

La Morgaŭ Librovendejo volis eldoni periodaĵon kaj petis ke Roushi estu la redaktoro. Li konsentis. La eldonisto ankaŭ volis presi miajn tradukojn kaj komisiis lin demandi al mi pri preslukro. Mi kopiis mian kontrakton kun Bei Xin Librejo kaj donis tiun al li, li metis ĝin en sian poŝon kaj hastis for. Tiam estis nokte de la 16a, januaro, 1931. Kiu sciis, ke tio tamen estis nia lasta

renkontiĝo kaj fina disiĝo.

La sekvan tagon li estis arestita en iu kunvenejo, kaj mi aŭdis ke la aŭtoritatularo estas serĉanta min, ĉar en lia poŝo troviĝis mia kontrakto. La kontrakto mem estas pura objekto, sed mi ne volas iri al la malpura loko por ekspliki. Mi memoras ke en la romano <La Vivo de Yue Fei> (8) estis respektinda monahxo, kiu "sidmortiĝis" kiam la arestantoj apenaŭ venis antaŭ la pordon de la pordon de la templo. Li eĉ postrestigis jenan versaron:

*Kiam persekuto venis el la oriento,
iris mi al Paradizo en la Okcidento.*

Tio estas la unika bona metodo de saviĝo el maro de suferoj, revata de sklavoj. Ĉar neniu "prodo" aperos, do la plej ideala estas tiu vojo. Mi mem ne estas respektinda monahxo, nek havas la liberon de nirvano, sed mi havas ankoraŭ sopiron vivi, do mi forfuĝis.

Tiun nokton, mi forbrulis malnovajn leterojn de amikoj, kaj, kunportinte mian infanon, mi iris kun mia edzino en hotelon. Post kelkaj tagoj, jam cirkulis onidiro ke mi estis arestita aŭ murdita. Sed pri Roushi estis tre malmulte da informo. Iuj diris ke li estis kondukita de policianoj el La Morgaŭ Librovendejo por konstati ĉu li estis la redaktoro aŭ ne; la aliaj diris ke li estis kondukita de policianoj al Bei Xin Librejo por konstati ĉu li estas Roushi mem, kaj liaj manoj surportis mankatenojn, kio signifas ke grava estis lia proceso, sed neniu sciis kio estis la kulpo.

Dum lia malliberiĝo, mi vidis du leterojn kiujn li skribis al samlokano. la unua estis jena:

24 Januaro

Mi atingis Longhua hieraŭ kune kun 35 aliaj malliberuloj (inkluzive 7 virinojn). Lastnokte ni estis enkatigitaj, tiel kreinte precedencon por politikaj malliberuloj. Tiu ĉi proceso implikas tro multe da homoj, sekve mi ne povas aspiri rapidan elkarceriĝon. La aferojn en Librejo volu peri por mi. Nun mi fartas bone kaj lernas germanan lingvon ĉe Yin Fu, sciigu tion al s-ro Zhou ke li ne zorgu. Ni ne estis torturita. Policejo kaj sekuriga oficejo plurfoje demandis min pri adreso de s-ro Zhou (9), sed, kompreneble, neniom mi sciis. Estu senzorga.

Ĉion bonan!

Zhao Shaoxiong

Tio estis sur la fronto de la paĝo.

Sur la dorso estis skribita:

Mi volas du aŭ tri ladbovojn. Se oni prohibos vin vidi min, transdonu ilin al Zhao Shaoxiong.


Li estis senŝanĝa, ankoraŭ volis lerni germanan lingvon kaj pli penas, kaj li ankoraŭ zorgas pri mi, same kiel kiam ni kune iris sur strato. Sed iuj vortoj en lia letero estas eraraj. Ili ja ne estis la unuaj kunkatenaj politikaj malliberuloj. Li rigardis la politikan rondon tro nobla, imagante ke tie regis ĉiam civilizacio kaj krueleco ekaperis nur ĉe li kaj amikoj. Fakte tute ne estis tia. Efektive, lia dua letero legiĝis jam tute malsama, tre amare, ke eĉ ŝvelis vizaĝo de f-ino Feng. Bedaŭrinde mi ne kopiis tiun leteron. Tiam la onidiroj despli multiĝis. Iuj diris ke li povus esti elaĉetita; aliaj ke li estis jam eskortita al Nankino. Nenio

aŭtentika. Dum pli kaj pli multe da leteroj kaj telegramoj alflugis pridemandi mian staton, kaj mia patrino en Pekino eĉ malsaniĝis pro maltrankvilo. Mi devis skribi leteron post letero por dementi la misonidiron kaj tiel forpasis ĉirkaŭ dudek tagoj.

La vetero pli malvarmiĝis. mi ne sciis ĉu Roushi havis litkovrilon tie? Ni havis. Ĉu li ricevis la ladbovojn? Sed tiam nin subite atingis aŭtentika informo, ke en la nokto de la sepa aŭ frumateno de la oka, februaro, Roushi kaj dudek tri aliaj estis pafmortigitaj en Longhua Garnizona Komandejo. Li estis trafita de dek kugloj.
Tiel!...

En iu profunda nokto, mi staris en korto de la hotelo, ĉirkaŭe amasiĝis difektaj objektoj. Ĉiuj endormiĝis, inkluzive miajn edzinon kaj infanon. Korpreme mi konsciis ke mi perdis bonegan amikon, ke Ĉinio perdis bonegan junulon. Mi silentiĝis, droninte en indignan triston; tamen, la kutimo sin levis el la silento kaj naskigis jenajn versojn:

*Printempo forpasis en nokto longdaŭra.
Griziĝis mi, fuĝe kun ido, edzin'.
En sonĝo tremetas larbrilo de panjo,
dum flagoj de Ĉefoj ŝanĝiĝas sen fin'. (10)
Amikoj fariĝis jam novaj fantomoj.
Ho, serĉu versojn el inter glavar'!
Sed kie l' poemo ekvidos la lumon?
Robnigron priverŝas la Lun' en amar'.*



Eble, la du lastajn versojn mi memoris jam ne bone. Fine mi kopiis tion kaj sendis al iu japana kantisto.

Sed en Ĉinio, tiam efektive nenie oni povas publikigi la poemon. Ni estis ŝlosita pli firme ol en lada skatolo. Mi memoris ke Roushi revenis sian hejmlokon jarfine kaj loĝis multajn tagojn, pro kio li estis riproĉita de amikoj post la reveno al Ŝanhajo. Li diris al mi en indigna malĝojo, ke blindiĝis jam ambaŭ okuloj de lia patrino, kiu petis ke li restu pli da tagoj. Kiel li povis tuj foriri? Mi komprenis la ameman koron de la blindiĝanta patrino kaj la sinceran koron de



Roushi.

Kiam <Norda Stelo> unuafoje eldoniĝis, mi volis verki ion pri Roushi, sed ne eblis. Mi nur elektis lignogravuraĵon de s-ino Kathe Kollwitz (11) titolitan "Viktimo", kiu esprimis patriron oferantan triste sian filon. Kaj nur mi sola sciis ke tio estis memoro por Roushi.

El la kvar junaj verkistoj samtempe murditaj mi neniam vidis Li Weisen, kaj kun Hu Yepin en Ŝanhajo mi intervidis nur unufoje kaj interŝanĝis malmultan parolon. La relative pli intime konata de mi estis Bai Mang, nome Yin Fu. Li iam korespondis kun mi kaj kontribuis por nia revuo. Sed mi trovas nenion de li hodiaŭ, tre eble, ĉion lian mi jam forbruligis en la nokto de deksepa, kiam mi ankoraŭ ne sciis ke ankaŭ li troviĝis inter la arestitoj. Tamen lia <Poemaro de Petofi> restas ankoraŭ ĉe mi; foliumante ĝin mi trovis nur kvar liniojn de la traduko plumskribitajn apud unu "Wahlspruch" (maksimo):

Vivo --- ja trezora,
sed pli karas am',
tamen, por libero
mi forlasus ambaŭ jam!

Sur la dua paĝo estis skribita "Xu Peigen"(12), kiun mi suspekto prenis por lia propra nomo.

5

Antaŭ du jaroj, hodiaŭ mi fuĝis en hotelon, dum ili iris al ekzekutejo. Antaŭ unu jaro, hodiaŭ mi eskapis al Angla Koncesio en kanonado, dume ili jam delonge enteriĝis kie oni ne



sciis. Nur ĉi jare, hodiaŭ mi ree sidas hejme. Ĉiuj endormiĝis, inkluzive miajn edzinon kaj infanon. Denove mi korpreme konsciis ke mi perdis bonegajn amikojn kaj Ĉinio bonegajn gejunulojn. Mi silentiĝis droninte en indignan triston, sed kutimo neatendite ree sin levis de la silento kaj igis min elverki la suprajn vortojn.

Se mi skribus plu, mi ankoraŭ neeble publikigos mian verkon en hodiaŭa Ĉinio. Dum mia juneco, kiam mi legis <Rememoron> de Xiang Ziqi(13), mi sentis strangon malkomprenante kial li verkis tiel malmulte da vortojn: tuja fino antaŭ ĵusa komenco. Tamen nun mi komprenas.

Ne estas tiel, ke la junaj skribis kondo-lencon por la maljunaj, sed dum lastaj tridek jaroj mi vidis ke akumuliĝis tavolo sur tavolo de sangoj de multaj junuloj, kiuj min enterigis tiel sufoke ke mi eĉ ne povas spiri. Mi nur povas per mia plumo skribi



kelkajn artikolojn, kvazaŭ elfosante etan aperturon tra la tero, per kio mi daŭrigos mian malfacilan spiron. Kia estas tiu ĉi mondo? La nokto estas longa, la vojo--- ankaŭ longa; eble, preferinde ke mi forgesu kaj silentu. Sed mi konfirme scias, ke, eĉ se ne mi, certe venos la tempo, kiam aliaj memoros ilin kaj parolos pri ili.....

7-8 februaro. 1933

Glosoj

(1) Je la 7a, februaro 1931, la kvin junaj verkistoj Yin Fu, Roushi, Li Weisen, Hu Yepin kaj Feng Keng estis sekrete murditaj de Kuomintang-aj reakciuloj. Lusin verkis tiun ĉi eseon je la dua datreveno de ilia morto.

(2) Bai Mang estis alia nomo de Yin Fu.

(3) Librejo en Tokio vendanta okcidentajn librojn.

(4) Membro de policejo en la Internacia Koncesio de Ŝanhajo, kiu portis tri striojn sur sia brakblazono.

(5) Fang Xiaoru(1357-1402) verkisto en Ming-dinastio, el la sama distrikto kiel Roushi. Lojala al imperiestro Huidi, li rifuzis servi al Princo Yan, kiu uzurpis al si la tronon, kaj pro tio li estis mortigita de la lasta.

(6) La samtempa japana artisto, kies verkon Ye Lingfeng plagiatis.

(7) Aludante pri la milito en la 28a, januaro 1932, kiam japana armeo ekinvadis

Ŝanhajon.

(8) Populara romano pri fama generalo Yue Fei (1103-1142) en Song-dinastio, kiu rezistis al nordaj tataroj.

(9) Origine Lusin nomiĝas Zhou Shuren.

(10) Aludante pri la kontinuaj militoj inter tiamaj militaristoj.

(11) Kathe Kollwitz(1867-1945), progresema lignogravura artistino. Ŝia verko malkovris la mallumon de kapitalisma socio kaj esprimis lukton, ribelon de popolo. Post la murdiĝo de la junaj verkistoj, ŝi kaj aliaj progresemaj verkistoj protestis al Kuomintang-a reakciularo.

(12) Xu Peigen fakte estis pli aĝa frato de Bai Mang, la ĉefo de Aviada Buroo de Kuomintango.

(13) Xiang Ziqi (ĉ.227-272), verkisto en Jin-dinastio (265-420), kiu, post murdiĝo de siaj intimaj amikoj, verkis <Rememoron> por ilin kondolenci. Tio estis tre mallonga poemeto nur el 150 vortoj.
(fino)

Tradukis Guozhu (2007-10-10) eLibrigis (2008-09-25)

Sur la foto (de maldekstre dekstren) estas Roushi, Baimang; Li Weisen, Hu Yeping kaj Feng Keng.

鲁迅:

为了忘却的纪念

—

我早已想写一点文字，来纪念几个青年的作家。这并非为了别的，只因为两年以来，悲愤总时时来袭击我的心，至今没有停止，我很想借此算是竦身一摇，将悲哀摆脱，给自己轻松一下，照直说，就是我倒要将他们忘却了。

两年前的此时，即一九三一年的二月七日夜或八日晨，是我们的五个青年作家（2）同时遇害的时候。当时上海的报章都不敢载这件事，或者也许是不愿，或不屑载这件事，只在《文艺新闻》上有一点隐约其辞的文章（3）。那第十一期（五月二十五日）里，有一篇林莽（4）先生作的《白莽印象记》，中间说：

“他做了好些诗，又译过匈牙利和诗人彼得斐〔5〕的几首诗，当时的《奔流》的编辑者鲁迅接到了他的投稿，便来信要和他会面，但他却是不愿见名人的人，结果是鲁迅自己跑来找他，竭力鼓励他作文学的工作，但他终于不能坐在亭子间里写，又去跑他的路了。不久，他又一次的被抓了。……”

这里所说的我们的事情其实是不确的。白莽并没有这么高慢，他曾经到过我的寓所来，但也不是因为我要求和他会面；我也没有这么高慢，对于一位素不相识的投稿者，会轻率的写信去叫他。我们相见的原因很平常，那时他所投的是从德文译出的《彼得斐传》，我就发信去讨原文，原文是载

在诗集前面的，邮寄不便，他就亲自送来了。看去是一个二十多岁的青年，面貌很端正，颜色是黑黑的，当时的谈话我已经忘却，只记得他自说姓徐，象山人；我问他为什么代你收信的女士是这么一个怪名字（怎么怪法，现在也忘却了），他说她就喜欢起得这么怪，罗曼谛克，自己也有些和她不大对劲了。就只剩了这一点。

夜里，我将译文和原文粗粗的对了一遍，知道除几处误译之外，还有一个故意的曲译。他像是不喜欢“国民诗人”这个字的，都改成“民众诗人”了。第二天又接到他一封来信，说很悔和我相见，他的话多，我的话少，又冷，好像受了一种威压似的。我便写一封回信去解释，说初次相会，说话不多，也是人之常情，并且告诉他不应该由自己的爱憎，将原文改变。因为他的原书留在我这里了，就将我所藏的两本集子送给他，问他可能再译几首诗，以供读者的参看。他果然译了几首，自己拿来了，我们就谈得比第一回多一些。这传和诗，后来就都登在《奔流》第二卷第五本，即最末的一本里。

我们第三次相见，我记得是在一个热天。有人打门了，我去开门时，来的就是白莽，却穿着一件厚棉袍，汗流满面，彼此都不禁失笑。这时他才告诉我他是一个革命者，刚由被捕而释出，衣服和书籍全被没收了，连我送他的那两本；身上的袍子是从朋友那里借来的，没有夹衫，而必须穿长衣，所以只好这么出汗。我想，这大约就是林莽先生说的“又一次的被抓了捕”的那一次了。

我很欣幸他的得释，就赶紧付给稿费，使他可以买一件夹衫，但一面又很为我的那两本书痛惜：落在捕房的手里，真是明珠投暗了。那两本书，原是极平常的，一本散文，一本诗集，据德文译者说，这是他搜集起来的，

虽在匈牙利本国，也还没有这么完全的本子，然而印在《莱克朗氏万有文库》(Reclam's Universal-Bibliothek) (6) 中，倘在德国，就随处可得，也值不到一元钱。不过在我是一种宝贝，因为这是三十年前，正当我热爱彼得斐的时候，特地托丸善书店 (7) 从德国去买来的，那时还恐怕因为书极便宜，店员不肯经手，开口时非常惴惴。后来大抵带在身边，只是情随事迁，已没有翻译的意思了，这回便决计送给这也如我的那时一样，热爱彼得斐的诗的青年，算是给它寻得了一个好着落。所以还郑重其事，托柔石亲自送去的。谁料竟会落在“三道头” (8) 之类的手里的呢，这岂不冤枉！

二

我的决不邀投稿者相见，其实也并不完全因为谦虚，其中含着省事的分子也不少。由于历来的经验，我知道青年们，尤其是文学青年们，十之九是感觉很敏，自尊心也很旺盛的，一不小心，极容易得到误解，所以倒是故意回避的时候多。见面尚且怕，更不必说敢有托付了。但那时我在上海，也有一个惟一的不但敢于随便谈笑，而且还敢于托他办点私事的人，那就是送书去给白莽的柔石。

我和柔石最初的相见，不知道是何时，在那里。他仿佛说过，曾在北京听过我的讲义，那么，当在八九年之前了。我也忘记了在上海怎么来往起来，总之，他那时住在景云里，离我的寓所不过四五家门面，不知怎么一来，就来往起来了。大约最初的一回他就告诉我是姓赵，名平复。但他又曾谈起他家乡的豪绅的气焰之盛，说是有一个绅士，以为他的名字好，要给儿子用，叫他不要用这名字了。所以我疑心他的原名是“平福”，平稳而有福，才正中乡绅的意，对于“复”字却未必有这么热心。他的家乡，是

台州的宁海，这只要一看他那台州式的硬气就知道，而且颇有点迂，有时会令我忽而想到方孝孺（9），觉得好像也有些这模样的。

他躲在寓里弄文学，也创作，也翻译，我们往来了许多日，说得投合起来了，于是另外约定了几个同意的青年，设立朝华社。目的是在介绍东欧和北欧的文学，输入外国的版画，因为我们都以为应该来扶植一点刚健质朴的文艺。接着就印《朝花旬刊》，印《近代世界短篇小说集》，印《艺苑朝华》，算都在循着这条线，只有其中的一本《拾谷虹儿画选》，是为了扫荡上海滩上的“艺术家”，即戳穿叶灵凤这纸老虎而印的。

然而柔石自己没有钱，他借了二百多块钱来做印本。除买纸之外，大部分的稿子和杂务都是归他做，如跑印刷局，制图，校字之类。可是往往不如意，说起来皱着眉头。看他旧作品，都很有悲观的气息，但实际上并不然，他相信人们是好的。我有时谈到人会怎样的骗人，怎样的卖友，怎样的吮血，他就前额亮晶晶的，惊疑地圆睁了近视的眼睛，抗议道，“会这样的么？——不至于此罢？……”

不过朝花社不久就倒闭了，我也不想说清其中的原因，总之是柔石的理想的头，先碰了一个大钉子，力气固然白化，此外还得去借一百块钱来付纸账。后来他对于我那“人心惟危”（10）说的怀疑减少了，有时也叹息道，“真会这样的么？……”但是，他仍然相信人们是好的。

他于是一面将自己所应得的朝花社的残书送到明日书店和光华书局去，希望还能够收回几文钱，一面就拚命的译书，准备还借款，这就是卖给商务印书馆的《丹麦短篇小说集》和戈理基作的长篇小说《阿尔泰莫诺夫之事业》。但我想，这些译稿，也许去年已被兵火烧掉了。

他的迂渐渐的改变起来，终于也敢和女性的同乡或朋友一同去走路了，但那距离，却至少总有三四尺的。这方法很不好，有时我在路上遇见他，只要在相距三四尺前后或左右有一个年青漂亮的女人，我便会疑心就是他的朋友。但他和我一同走路的时候，可就走得近了，简直是扶住我，因为怕我被汽车或电车撞死；我这面也为他近视而又要照顾别人担心，大家都苍皇失措的愁一路，所以倘不是万不得已，我是不大和他一同出去的，我实在看得他吃力，因而自己也吃力。

无论从旧道德，从新道德，只要是损己利人的，他就挑选上，自己背起来。他终于决定地改变了，有一回，曾经明白的告诉我，此后应该转换作品的内容和形式。我说：这怕难罢，譬如使惯了刀的，这回要他耍棍，怎么能行呢？他简洁的答道：只要学起来！

他说的并不是空话，真也在从新学起来了，其时他曾经带了一个朋友来访问我，那就是冯铿女士。谈了一些天，我对于她终于很隔膜，我疑心她有点罗曼谛克，急于事功；我又疑心柔石的近来要做大部的小说，是发源于她的主张的。但我又疑心我自己，也许是柔石的先前的斩钉截铁的回答，正中了我那其实是偷懒的主张的伤疤，所以不自觉地迁怒到她身上去了。——我其实也并不比我所怕见的神经过敏而自尊的文学青年高明。

她的体质是弱的，也并不美丽。

三

直到左翼作家联盟成立之后，我才知道我所认识的白莽，就是在《拓荒者》上做诗的殷夫。有一次大会时，我便带了一本德译的，一个美国的新

闻记者所做的中国游记去送他，这不过以为他可以由此练习德文，另外并无深意。然而他没有来。我只得又托了柔石。

但不久，他们竟一同被捕，我的那一本书，又被没收，落在“三道头”之类的手里了。

四

明日书店要出一种期刊，请柔石去做编辑，他答应了；书店还想印我的译著，托他来问版税的办法，我便将我和北新书局所订的合同，抄了一份交给他，他向衣袋里一塞，匆匆的走了。其时是一九三一年一月十六日的夜间，而不料这一去，竟就是我和他相见的末一回，竟就是我们的永诀。第二天，他就在一个会场上被捕了，衣袋里还藏着我那印书的合同，听说官厅因此正在找寻我。印书的合同，是明明白白的，但我不愿意到那些不明不白的地方去辩解。记得《说岳全传》里讲过一个高僧，当追捕的差役刚到寺门之前，他就“坐化”了，还留下什么“何立从东来，我向西方走”的偈子（11）。这是奴隶所幻想的脱离苦海的惟一的好方法，“剑侠”盼不到，最自在的惟此而已。我不是高僧，没有涅槃的自由，但我还想生，于是就出走（13）。

这一夜，我烧掉了朋友们的旧信札，就和女人抱着孩子走在一个客栈里。不几天，即听得外面纷纷传我被捕，或是被杀了，柔石的消息却很少。有的说，他曾经被巡捕带到明日书店里，问是否是编辑；有的说，他曾经被巡捕带往北新书局去，问是否是柔石，手上上了铐，可见案情是重的。但怎样的案情，却谁也不明白。

他在囚系中，我见过两次他写给同乡（14）的信，第一回是这样的——

“我与三十五位同犯（七个女的）于昨日到龙华。并于昨夜上了镣，开政治犯从未上镣之纪录。此案累及太大，我一时恐难出狱，书店事望兄为我代办之。现亦好，且跟殷夫兄学德文，此事可告周先生；望周先生勿念，我等未受刑。捕房和公安局，几次问周先生地址，但我那里知道。诸望勿念。祝好！”

赵少雄一月二十四日。”

以上正面。

“洋铁饭碗，要二三只如不能见面，可将东西望转交赵少雄”

以上背面。

他的心情并未改变，想学德文，更加努力；也仍在纪念我，像在马路上行走时候一般。但他信里有些话是错误的，政治犯而上镣，并非从他们开始，但他向来看得官场还太高，以为文明至今，到他们才开始了严酷。其实是不然的。果然，第二封信就很不同，措词非常惨苦，且说冯女士的面目都浮肿了，可惜我没有抄下这封信。其时传说也更加纷繁，说他可以赎出的也有，说他已经解往南京的也有，毫无确信；而用函电来探问我的消息的也多起来，连母亲在北京也急得生病了，我只得一一发信去更正，这样的大约有二十天。

天气愈冷了，我不知道柔石在那里有被褥不？我们是有的。洋铁碗可曾收到了没有？……但忽然得到一个可靠的消息，说柔石和其他二十三人，已于二月七日夜或八日晨，在龙华警备司令部被枪毙了，他的身上中了十弹。

原来如此！……

在一个深夜里，我站在客栈的院子中，周围是堆着的破烂的什物；人们都睡觉了，连我的女人和孩子。我沉重的感到我失掉了很好的朋友，中国失掉了很好的青年，我在悲愤中沉静下去了，然而积习却从沉静中抬起头来，凑成了这样的几句：

惯于长夜过春时，挈妇将雏鬓有丝。

梦里依稀慈母泪，城头变幻大王旗。

忍看朋辈成新鬼，怒向刀丛觅小诗。

吟罢低眉无写处，月光如水照缁衣。

但末二句，后来不确了，我终于将这写给了一个日本的歌人〔15〕。

可是在中国，那时是确无写处的，禁锢得比罐头还严密。我记得柔石在年底曾回故乡，住了好些时，到上海后很受朋友的责备。他悲愤的对我说，他的母亲双眼已经失明了，要他多住几天，他怎么能够就走呢？我知道这失明的母亲的眷眷的心，柔石的拳拳的心。当《北斗》创刊时，我就想写

一点关于柔石的文章，然而不能够，只得选了一幅珂勒惠支(Kathe Kollwitz)夫人的木刻，名曰《牺牲》，是一个母潜*哀地献出她的儿子去的，算是只有我一个人心里知道的柔石的纪念。

同时被难的四个青年文学家之中，李伟森我没有会见过，胡也频在上海也只见过一次面，谈了几句天。较熟的要算白莽，即殷夫了，他曾经和我通过信，投过稿，但现在寻起来，一无所得，想必是十七那夜统统烧掉了，那时我还没有知道被捕的也有白莽。然而那本《彼得斐诗集》却在的，翻了一遍，也没有什么，只在一首《Wahlspruch》(格言)的旁边，有钢笔写的四行译文道：

“生命诚宝贵，
爱情价更高；
若为自由故，
二者皆可抛！”

又在第二叶上，写着“徐培根”〔16〕三个字，我疑心这是他的真姓名。

五

前年的今日，我避在客栈里，他们却是走向刑场了；去年的今日，我在炮声中逃在英租界，他们则早已埋在不知那里的地下了；今年的今日，我才坐在旧寓里，人们都睡觉了，连我的女人和孩子。我又沉重的感到我失掉了很好的朋友，中国失掉了很好的青年，我在悲愤中沉静下去了，不料积习又从沉静中抬起头来，写下了以上那些字。

要写下去，在中国的现在，还是没有写处的。年青时读向子期《思旧赋》

(17), 很怪他为什么只有寥寥的几行, 刚开头却又煞了尾。然而, 现在我懂得了。不是年青的为年老的写纪念, 而在这三十年中, 却使我目睹许多青年的血, 层层淤积起来, 将我埋得不能呼吸, 我只能用这样的笔墨, 写几句文章, 算是从泥土中挖一个小孔, 自己延口残喘, 这是怎样的世界呢。夜正长, 路也正长, 我不如忘却, 不说的好罢。但我知道, 即使不是我, 将来总会有记起他们, 再说他们的时候的。……二月七——八日。

备注:

(1) 本篇最初发表于一九三三年四月一日《现代》第二卷第六期。

(2) 五个青年作家参看本卷第 283 页注 (2)。(3) “左联”五位作家被捕遇害的消息,《文艺新闻》第三号(一九三一年三月三十日)以《在地狱或人世的作家?》为题,用读者致编者信的形式,首先透露出来。

(4) 林莽即楼适夷,浙江余姚人,作家、翻译家。当时“左联”成员。

(5) 彼得斐(PetfiSándor, 1823—1849)通译裴多菲,匈牙利爱国诗人。主要诗作有《勇敢的约翰》、《民族之歌》等。(6)《莱克朗氏万有文库》一八六七年德国出版的文学丛书。

(7) 丸善书店日本东京一家出售西文书籍的书店。(8)“三道头”当时上海公共租界里的巡官,制服袖上缀有三道倒人字形标志,被称作“三道头”。

(9) 方孝孺(1357—1402)浙江宁海人,明建文帝朱允吧时的侍讲学士、文学博士。建文四年(1402)建文帝的叔父燕王朱棣起兵攻陷南京,自立为帝(即永乐帝),命他

起草即位诏书;他坚决不从,遂遭杀害,被灭十族。

(10)“人心惟危”语见《尚书·大禹谟》。(11)《说岳全传》清代康熙年间的演义小说,题为钱彩编次,金丰增订,共八十回。该书第六十一回写镇江金山寺道悦和尚,因同情岳飞,秦桧就派“家人”何立去抓他。他正在寺内“升座说法”,一见何立,便口占一偈死去。“坐化”,佛家语,佛家传说有些高僧在临终前盘膝端坐,安然而逝,称作“坐化”。偈子,佛经中的唱词,也泛指和尚的隽语。

(12) 涅`剧》 鸺 矣 铮 饕 琶 稊 13. 饕 训 龇 阜 鸷 透 呱 乃 劳 觶 步 性 布 拧: 罄*引伸作死的意思。

(13) 柔石被捕后,作者于一九三一年一月二十日和家属避居黄陆路花园庄,二月二十八日回寓。

(14) 指王育和,浙江宁海人,当时是慎昌钟表行的职员,和柔石同住闸北景云里二十八号,柔石在狱中通过送饭人带信给他,由他送周建人转给作者。

(15) 日本歌人指山本初枝(1898—1966)。据《鲁迅日记》,一九三二年七月十一日,作者将此诗书成小幅,托内山书店寄给她。(16)“徐培根”白莽的哥哥,曾任国民党政府的航空署长。(17) 向子期(约 227—272)向秀,字子期,河内(今河南武陟)人,魏晋时期文学家。他和嵇康、吕安友善。《思旧赋》是他在嵇、吕被司马昭杀害后所作的哀悼文章,共一百五十六字(见《文选》卷十六)。

